# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - **66000 PERPIGNAN** (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : **9** F. C. C. P. 956-28 Montpellier

4-a Kvaronjaro 1977 N° 65

# Laborkunsido en Sete

*AUTUNA KUNVENO*
*DE LA FEDERACIA KOMITATO*

Dimanĉon la 16-an de oktobro akceptis nin la ĉiam gastema "Centre Familial du Lazaret". Ĉeestis 16 gesamideanoj inter kiuj 9 estraranoj kaj komitatanoj. S-ro RAYNAUD petis senkulpigon pro malsano.

De 9 h 45 ĝis 12 h 15 okazis la unua laborkunsido.

Post enkondukaj vortoj de S-ro LLECH-WALTER estis decidite ke li kunordigos la dissendon de la franclingvaj tekstoj de "Esperanto-Informations" al la ĉefaj redaktorejoj de la plej gravaj ĵurnaloj -regionaj, kompreneble- tiel ke, plej grandskale kiel eble, la publiko estu informita pri la vivo de la movado .

La 28-an de oktobro okazos televida "libera tribuno" pri U.F.E. kaj S-ro AMOUROUX insistis por ke ĉiu skribu al F.R.3 dankante kaj petante pli larĝan debaton pri Esperanto kaj la malfermon de televida E-kurso.

S-ino NEGRON eksplikis ke nia financa situacio estas bona. Ŝi mendos de UEF kun senpera sendo al S-ro FRUS, 150 ekzemplarojn de la nova "Esperanto-Actualités" por aldono al "Sudfranca Stelo".

La budĝeto por "Sudfranca Stelo" estas iom deficita malgraŭ la grava helpo de nia amiko FRUS, profesia presisto. Estis decidite, per 6 aproboj (4 kontraŭaj opinioj k. 3 sindetenoj) forigi el la listo de la ricevantoj ĉiujn nomojn kiuj, ĝis nun, ricevis senpage nian bultenon escepte de la laŭleĝe devigaj ekzemplaroj por oficialaj instancoj, U.E.A. k. U.F.E. Tiel la abonprezo por 1978 restas senŝanĝe fiksita je 7,00 F.

Pri la aŭtuna agado de la grupoj raportis :

NARBONNE : S-ro DELIGNE .

Li plendas, ke li ne ricevis la necesajn informojn de la varbkomisiono de UFE En Narbonne okazos elementa kurso por 5-6 gelernantoj kaj duagrada kurso por 2. Ĉi somere, en Grésillon, S-ro COQUIN trapasis la skriban parton de la " atesto pri kapableco".

NIMES : S-ino VOLPELIERE.

Aperis artikoloj en 2 ĵurnaloj k. radio.
Funkcios 3 kursoj : unuagrada ( 1 lernanto), duagrada ( 4 gelernantoj), triagrada (3 lernantinoj).
Espereble baldaŭ eblos starigi E-Klubon ĉe la Liceo A. Daudet.
Ĉi-somere, en Grésillon, S-ino MOUNIER trapasis la duagradan ekzamenon.

MONTPELLIER : D-ino VIERNE .

Aperis anoncoj en lokaj gazetoj.
Tre provizore ne ekzistas publikaj kursoj sed unu funkcias por 9 gelernantoj, ĉe privata asocio ("Société Nationale Immobilière"). S-ro LENTAIGNE ĉiam helpopretas kaj daŭrigas sian efikan laboron.

PERPIGNAN : Esperantista Kultucentro -: S-ro LLECH-WALTER .

Artikoloj en 3 ĵurnaloj. Du kursoj funkcias : elementa por 6 gelernantoj kaj duagrada por 8 gelernantoj.

-U.S.C.M.-ESPERANTO : S-ro AMOUROUX
Artikoloj en 4 ĵurnaloj.

........./.........

La grupo aranĝis vastan ekspozicion en la kvartala lernejo. Post per-afiŝa kampanjo 4 ĵurnaloj reklamis kaj 3 raportis kun foto.
Sekve de tio kaj dank'al la kombinita agado de la kernaj membroj 3 kursoj funkcias ( la nombro de la gelernantoj iom ŝanĝiĝis kaj la jena estas la nuna) :
- marde : kurso por 4 progresemuloj
- ĵaŭde : - unuagrada kurso por plenkreskuloj
  - elementa kurso por 15 geknaboj 9-12 jaraj.
La kursoj,kvankam ne devigaj, estas oficialaj kaj funkcias ĉe la kvartala lernejo H. Rigaud kun permeso de la lernejestro,urbestro kaj akademia inspektoro. La grupo ricevis du subvenciojn (200,oo F de la urbestraro k. 100,oo F de la sport-kultura asocio U.S.C.M.), kiujn ĝi transsendis profite al la varbkomisiono de U.F.E.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

Pri la "enketiloj" de la varbkomisiono de U.F.E. la ĝenerala impreso estas ke ne ĉiam kongruas varbi k. monpeti.

S-ro ABECASSIS petis ke oni konsilu al esperantistoj ĉiam surhavi la esperantistan insignon. Ankaŭ efikas glustelo sur aŭtomobiloj.

Por la komuna tagmanĝo,ekde la 14-a, rekomenciĝis la laborkunsido, kiu finiĝis unu horon kaj duonon poste.

Ĉar niaj statutoj diras ke la federacia komitato estas elektita por 3 jaroj,trione renovigebla ĉiujare dum la federacia jarkongreso, la venonta federacia kongreso do elektos 5 el la 15 membroj de la komitato. La sorto decidis pri la nomo de S-ro DELIGNE,D-ro SALAN,S-ino NEGRON,S-ro ENSUQUE k. S-ino VOLPELIERE. Memkompreneble ili povos rekandidatiĝi sed ankaŭ aliaj agemaj esperantistoj, kiuj pretas agadi en la sino de la federacio povos kandidatiĝi.

Pri pasintaj kongresoj raportis :
- D-ro SALAN kaj D-ino VIERNE : U.K. en Islando.
- S-ro DELIGNE : fervojista renkontiĝo en La Grande Motte
- S-ino VOLPELIERE : mondfederalista kongreso en Parizo. La kongresintaj esperantistoj atingis gravan sukceson por Esperanto ( vidu la lastan numeron de "Sudfranca Stelo") sed,por ke tiu sukceso estu plifirmigita, estas necese ke la esperantistoj , kontraŭ vere tre modesta dumviva kotizo, pligrandigu la vicojn kaj fariĝu mondcivitanoj. Sin turni al S-ino VOLPELIERE en Nîmes .
- D-ino VIERNE partoprenis la kongreson de K.E.L.I. en Glasgovo.

Pasint. jare,en Nîmes, ni decidis ke niaj federaciaj kongresoj estos dutagaj tiel ke la novbakitaj esperantistoj povu interesiĝi tra kulturo aŭ distra programo.Nia venontjara federacia kongreso okazos en SETE ĉe la agrabla " Centre Familial du Lazaret", sabaton la 22-an kaj dimanĉon la 23-an de aprilo 1978 .

La nacia kongreso okazos en CLERMONT-FERRAND,je Pentekosto 1978. Mi sendis bondeziran karton al S-ro RAYNAUD (Alès) kaj F-ino ROLLE (Nîmes),malsanaj, kaj al rumanaj gesamideanoj kiuj,vizititaj de Ges-roj DELIGNE salutis kaj bondeziris nin .

Jean AMOUROUX

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

## KURAĜIGO AL BONFARO . . . .

La Prezidanto de la Franca Senato,S-ro Alain POHER (Parizo) kiu prezidas la Nacian Societon " Kuraĝigo al Bonfaro " decidis doni la oran medalon de la Societo al S-ro René LLECH-WALTER el Perpignan.

Jen la titoloj kiuj pravigas tiun dekoracion :

Honora Prezidanto de Franca Unio por Esperanto;Prezidanto de la sekvantaj societoj : Federacio d'Esperanto "Langvedoko-Rusiljono",Kultura Esperantista Centro en Perpignan,Politeknika Asocio,Gajaj Katalunaj Trobadoroj,Interhelpa Rusiljono Asocio.

Sekretario de "Instituto pri katalunaj studoj", Ruĝa Kruĉo.

Kasisto de la departementa literatura kaj scienca Asocio.

"Mestre en Gai Saber" de "Félibrige" kaj de la Floraj Ludoj.Membro de la Aŭtora kaj Komponista Societo.

L . . . / . . . .

La lastaj titoloj ekster esperanto permesis trovi helpon ĉe la oficialaj instancoj kiam temis pri esperanto ,la laboro estas certe granda sed la rezulto ankaŭ.

La regiona gazetaro kaj radio raportis pri la agado de 1921 ĝis hodiaŭ de la delegito de UEA en Perpignan okaze de la franca semajno-propagando.

A. V.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

QUILLAN (S-ro F. REGNIER -11,rue de la Mairie - 11500 QUILLAN ).

En la kadro de la nacia kampanjo de U.E.F. nia amiko REGNIER,helpita de Ges-roj GRANADO kaj S-ro DEJARDIN (nun loĝanta en Bagnieres de Bigorre) aranĝis celtrafan ekspozicion la 22-an kaj 23-an de oktobro.

Dank'al la vekita intereso novaj kursoj funkcias en Quillan.

La taĝjurnalo " l'Independant" tre longe kaj laŭde raportis .

Jean AMOUROUX

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

HUBERT FEREZ

La direktoro de la trimestra bulteno "Concorde" mortis en NICE, la 17-an de Septembro. Li kreis la esperantan gazeton "La Tribune Esperantiste", fondis la asocion : "Groupe esperantiste de l'Enseignement".

Kiel instruisto li sukcesis oficiale enirigi esperanton en siaj klasoj en Strasbourg kaj ankaŭ ĉe la Popola Universitato.

Emerito li loĝis en NICE kaj eldonis ĝis sia morto la organon de la Provenca Federacio "Concorde" .

" Sudfrancia Stelo " prezentas siajn sincerajn kondolencojn al familio .

R. L - W.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

PERPIGNAN .-

Samideano Karel BRAET,el Belgujo, instruisto en Zairio,emeritiĝis kaj loĝas nun en Perpignan .

Li estas la filo de Léon BRAET kiu estis,dum multaj jaroj, delegito de U.E.A. en Nieuport .

La Kultura Esperantista Centro en Perpignan akceptis Karel BRAET dum amika festo kaj nia belga samideano gvidas nun unu el la tri kursoj de la Centro, 72,Avenue du Général de Gaulle,en Perpignan,Francio .

R. L - W.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

FEDERATION du GARD pour l' ESPERANTO

La kotizo estas senŝanĝa por la jaro 1978, t.e. 2 F$^{oj}$

La abono al SUDFRANCIA STELO,Bulteno de la regiona federacio Langvedoko-Rusiljono estas 9 F.oj.

La izoluloj pagu do 11 F.oj al Fédération du Gard pour l'ESPERANTO :

C.C.P. Montpellier 1.857 - 07

Por la grupanoj de NIMES kaj ALES tuj kotizo kaj abono estas entenataj en la grupa kotizo.

La jara kunveno okazos en ALES (Komunuma Kultura Centro,2,Pl.H. Barbusse ) DIMANĈON la 15-an de JANUARO, je la 9-a kaj duono .

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

# RESTARIGO DE LA GRUPO "ESPERANTO" DE PERPIGNAN POST LA MILITO 1914-1918

## (Unua parto : ĝis la milito 1939-45)

La I-an de Marto 1921,kun mia frato Johano kaj kelkaj studentoj, ni fondis la studan centron " Le CENACLE " kun la celo havi bibliotekon kaj organizi prelegojn prò diversaj studaj temoj;pro tio nè luis ĉe teretaĝo,3,Impasse Emile Zola en Perpignan, grandan ĉambron por la prelegoj kaj kursoj, kaj ĉambreton por la biblioteko.

Sed mankis la meblaro ! Feliĉe juna studento klarigis ke li konas S-ron Joseph SANS,profesoro de esperanto, kiu gardas, de la grupo "Esperanto" antaŭ la milito, tablojn,seĝojn kaj ....bibliotekon. Estis nur unu kondiĉo por tiu donaco : S-ro SANS gvidos esperantan kurson ĉe nia sidejo. Propono unuanime aprobita, kaj jen kiamaniere mi fariĝis esperantisto.

Mi retrovis la protokolon de la unua kunveno de la grupo "Esperanto",jen ĝi : "La 17-an de Junio 1921 fondiĝis en Perpignan sub la nomo "Grupo Esperanto" societo, kiu celas la lernadon,la propagandon kaj la aplikadon de la helpa lingva internacia "Esperanto". La societo entenas aktivajn membrojn kaj honorajn membrojn. Enirprezo : 5 F-oj,monata kotizo : 2 F-oj.

La sidejo de la grupo,estas : 3,Impasse Emile Zola,Perpignan,sidejo prunetedonite almenaŭ unu fojon semajne vespere de la societo "Le Cénacle". Kompense, la grupo "Esperanto" pagos al la societo "Le Cénacle" 50 % de la monataj kotizoj".

La unua estraro de la grupo "Esperanto" estis : Honora Prezidanto : Frédéric CROS,Prezidanto : Emile BELLSOLA,Vic-Prezidanto : Joseph BENAVAIL,Sekretario : Joseph SANS,Helpsekretario : Jean LLECH,Kasisto : Raymond GOUDIN,Helpkasisto :René LLECH,arĥivisto : TALON Pierre. Sekvis listo de 15 membroj ..

Mi havis je tiu epoko 15 jarojn kaj la entuziasmon de la juneco; mi multe propagandis, kaj eĉ maljunulo de la grupo riproĉis al mi tro tamburi por esperanto. De 1921 mia devizo estas " ĉiam antaŭen !". Mi daŭrigos la propagandon kaj mi faros tion ĝis mia morto §

Ni organizis la 9 an de Decembro 1923 departementan kongreson en Perpignan kun la ĉeesto de gesamideanoj el Le Boulou,Maureillas,Céret kaj eĉ tiu de S-roj CHALER el Tarrassa kaj COMELLAS el Vich !

S.F.P.E. dezirus ke ni okupiĝus pri Mediteranea Federacio ( de Cerbère al Mento),sed estas tro vasta tereno kaj oni kreis la Provencan Federacion kaj Langvedoka-Rusiljonan Federacion.

Dum 1926 mi devis militservi, sed ĉar mi estis profesoro de stenografio ĉ ĉe lernejo Pigier oni funkciigis min kiel stenografon ĉe la Ministerio de la Milito en Parizo..

Mia frato Jean loĝis, je tiu epoko, en Puteaux, kaj ni organizis la kongreson de la Pariza Federacio. Mi memoras, ke ĉeestis en uniformo, Generalo BASTIEN.

Mi revenis al Perpignan dum 1928,mia frato ankaŭ, li fondis komercan lernejon kaj mi librotenadan oficejon.

Dum decembro 1932, vizitis la grupo Elinjo PAHN el Estonio; ŝi estis Ĉe-metoda instruistino kaj ŝi prelegis por la grupanoj .

Je tiu epoko, grava evento ! Dank'al lernolibroj aĉetitaj ĉe brokantisto, S-ro Robert GENDRE esperantiĝis kaj ĉeestis la kursojn gvidatajn de mia frato kaj mi-mem ĉe "Ecole Commerciale" 7,Rue de l'Avenir.

Dum 1933,la kursoj translokiĝis al Ecole Lavoisier,Rue de la Cloche d'Or, kaj mi havis la plezuron doni la diplomon de "plej bona lernanto " al Robert GENDRE, kiu poste multe helpis min por la gvidado de la kursoj kaj la tradukado de la prelegoj.


Sabaton la 9-an de Februaro 1935,vespere, alvenis en Perpignan Lidja ZAMENHOF,filino de la Majstro, por gvidi unu monatan kurson per la ĉe-metodo. La kursoj okazis ĉiu-vespere ĉe lernejo Lavoisier. Dimanĉon la 10-an de februaro,ŝi estis akceptita ĉe la urbodomo de Victor DALBIEZ,Senato-Urbestro, kiu,en 1906,eklernis Esperanton es Dieppe.

Lundon 11 an de februaro akcepto ĉe la Komerca Ĉambro. Vespere komenciĝis la kurso kiu daŭris ĝis la 6-a de marto 1935. Robert Gendre rolis kiel tradukanto.

Mardon la 12-an de februaro la "Rotary-Club" invitis Lidja ZAMENHOF kaj mi-mem por partopreni la semajnan tagmanĝon kaj paroli pri Esperanto. Mi tradukis kaj donis informojn pri la regiona kaj loka movado .

..../....

# KRUCVORTOJ




## Horizontale ❋

1- Nebonvenaj gastetoj en la kuirejo
7- Fritadlikvaĵo .... kaj hispana "hura"
8- Duontono
9- Ŝisteme noti
14- Ĉe la tablo ĝi aperas en la manoj
16- La fil' de la frato, por la onklo
18- Fino de la okshoft'
21- Ĝi aperas sub la teleroj
26- Pana malt' Fariĝas strategia ŝakovenk'
27- Eksteren
29- Ricevanto de ago
30- La plej profundaj, en kiujn oni manĝas

## Vertikale ❋

1- Ĉiu objekto konsistas el .... kaj materio
2- Unkta
3- Tie regas la reĝo
4- Viandaĵon kun la osto
5- La inverso futura de: 8-horizontale
6- Element kiu ofte enestas en la salo
10- Ĝi grimpas, por ekest'
11- Laude al si mem
12- Turnita par', por manĝebla glob'.
13- Malreven
15- Lirika poem'
17- Sufikso kun la dua vokalo
18- Sufikso numera
19- Maligna kreskaĵo
20- En ili oni kuiras
22- La koro de la napo
23- La tago duonfinita
24- Speco de ujo por manĝrestaĵoj
25- Diserv'
28- Pagata pruntepren



# Enigmo ĉe la manĝotablo

❋ - La solvo aperos en la venonta numero

❋


Solvo de la krucvortoj aperintaj en la N° 62

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| K | R | I | S | T | N | A | S | K | O |
| O | ■ | ■ | A | R | I | S | T | ■ | L |
| K | L | E | R | A | ■ | ■ | ■ | E | I |
| R | I | S | K | ■ | ■ | M | A | L | V |
| ■ | S | T | A | N | D | A | R | D | O |
| S | T | A | N | D | A | R | D | O | ■ |
| E | O | S | T | ■ | ■ | L | A | N | T |
| N | J | ■ | ■ | ■ | H | E | R | O | A |
| A | ■ | F | A | R | U | N | ■ | ■ | R |
| P | E | N | T | O | F | A | R | A | D |

# 5 minutoj de paùzo





Iun tagon la helikpatrino promenante en la arbaro siajn idojn renkontis limakon, ŝi tuj diris : - Ne rigardu estas nudisto !





Irante al restoracio kun la tuta familio, la patromuso haltis por observi vesperton, senheziti unu filo kriegas :
— Patro rigardu anĝelon. . .



Kara fraùlo viaj nervoj estas tre malfortaj, evitu kolerojn, unue rigardu neniam la prezojn en la magazenoj.



AKTUALA PAROLADO
Sincere, kie vi rimarkas la malaltajn prezojn ?
— En la monujo.



NOKTE - Bonvolu indiki al mi kie estas strato Londono ?
Post la sepa ŝtelisto maldekstren.

R. Frus



DOMOJ ANTAUFABRIKATAJ
— Vidu Tereza, plurfoje mi ripetis al vi :
Atenton ! Ne sekigu la aferojn antaùen !

Dimanĉon la 3 an de marto 1935 ŝi prezidis la jarkongreson de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" en la urbo de Perpignan. Vespere ŝi prelegis pri Pollando.

Sekve de tiu vizito de Lidja ZAMENHOF, la 20 an de decembro 1935, la urbokonsilantaro decidis nomi "ZAMENHOF-Strato" novan straton de Perpignan situanta (ankoraŭ nune) inter la ĉefa poŝtoficejo kaj la "konsula palaco".

Ĉiuj dimanĉoj matene mi gvidis kurson de Esperanto en Le Boulou (20 km el Perpignan) kaj Maureillas (apud Le Boulou). En Céret (8 km el Maureillas) estis esperantista grupo, kies gvidantoj estis Ges-roj JULIA. Tio permesis al la Hungara Poeto Julio BAGHY, fama verkisto, okaze de vizito al la grupo de Perpignan, ne nur prelegi en tiu-ĉi urbo sed ankaŭ en Le Boulou, Maureillas kaj Céret.

Dum tiu epoko estis ligilo inter la grupoj de la departemento kaj multaj komunaj ekskursoj okazis sub la devizo :"Ĉiam amike kaj tolereme!".

Dimanĉon la 11 an de aprilo 1937 okazis federacia kongreso en Perpignan. Foto de la 25 lernantoj, della profesoro kaj de la Direktoro S-ro VIEILLEDENT, aperis en la ĵurnalo "L'Indépendant" la 24 an de majo 1939 §(" " kaj inaŭguro de la Strato Zamenhof !))

Mi partoprenis la organizadon de la Federacia Kongreso en Sète kaj mi havis la grandan plezuron prezidi kun S-ro PARISELLE, Rektoro de la Universitato. Sed venis la milito 1939-45. Kiel Robert GENDRE, mi estis militkaptita kaj sendita al Stalag XI A, Altelgrabov, inter Magdeburgo kaj Berlino. Vespere en Grossasleben kaj Wernigerode, mi gvidis kurson de Esperanto, sed ĉar Esperanto estis malpermesita, mi baptonomis mian kurson "Hispana Kurso" !

Kio okazis post la milito ? Tio estos la temo de mia venonta artikolo.

René LLECH - WALTER

P.S.- Mi kore dankas Robert Gendre kaj Jean Amouroux, kiuj komunikis notojn pri tiu antaŭmilita epoko. Se kelkaj samideanoj havas ankaŭ informojn, ili povas rekte skribi al mi, tiamaniere mi kompletigos mian unuan artikolon. Dankon ! R. L-W.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO — LANGVEDOKA-RUSILJONA FEDERACIO

INSTITUT FRANCAIS d'ESPERANTO — 1976 - 1977

LISTO de la SUKCESINTOJ

-o-o-o-o-o-

ATESTO pri LERNADO

| | |
|---|---|
| ENSUQUE Louis | B |
| GENTILI Eliane | |
| GRAND Madeleine | TB |
| LAGRANGE Claude | |
| QUIOT Patrice | |
| MAS Marie-Thérèse | B |
| SAUMADE Sonia | B |

ATESTO pri PRAKTIKA LERNADO :

| | |
|---|---|
| MOUNIER Clarisse | SB |
| PERIER Marcel | SB |
| PLANES Fernande | B |

AL NIAJ LEGANTOJ

NI ESPRIMAS BONAN NOVJARON

# INTERNACIA FEDERACIO de la MOVADOJ

## por MODERNA PEDAGOGIO - (FREINET -PEDAGOGIO)

## 11-a INTERNACIA FERIA kaj PEDAGOGIA RENKONTIĜO 1978 en SVEDIO

La 11-a Renkontiĝo Internacia de Edukistoj FREINET (R.I.D.E.F.) okazos en ARJANG (Svedio), dum la dua duono de julio 1978.

Dum antaŭaj renkontiĝoj, parteprenantoj jam uzis Esperanton, sed nur iom, dum parto de la aktivaĵoj. En Pollando (1976), Esperanto fariĝis unu el la oficialaj debatlingvoj. En 1977, en Lisbono, ni faris novan paŝon antaŭen, dank'al partoprenado de esperantistoj ankoraŭ pli multnombraj .

Kaj, fine en 1978, en Svedio, nia celo estas tia : ke la esperantistaj partoprenantoj estos tiel multnombraj kaj multnaciaj ke esperanto fariĝu la ĉefa kaj kvazaŭ la sola lingvo utiligita. Tio levos grandan eĥon en la Freinet-Movadoj, kiuj havas membroj en 38 landoj, kaj ankaŭ prezentos gravajn avantaĝojn por la tuta Esperanta Movado.

Dum tiu R.D.E.F., la partoprenantoj povos :

1) - intime konatiĝi kun Svedio dank'al helpo kaj gvidado de svedaj Esperantistaj gekolegoj ;

2) - travivi la Freinet-pedagogion, kiel plenkreskuloj, uzante ties fundamentajn teknikojn tio estus plej bona iniciado.

3) - praktike uzi esperanton .

Do, jen unika okazo ! Trian fojon en internacia kongreso de edukistoj organizita de NE ESPERANTISTA Internacia Pedagogia Asocio, Esperanto estos grandskale utiligita...Ni profitu ĝin por nia propra bono, kaj ankaŭ por elmontri konkretan realigadon al la septikuloj. La franca samideano, kiu okupiĝas pri la organizado de tiu renkontiĝo, esperas gravan partoprenon de diverslandaj geinstruistoj, kaj deziras scii, kiel eble plej frue, nomojn de la eventualaj partoprenantoj. Kontaktu viajn eksterlandajn korespondamikojn, informu kolegojn intere siĝantajn pri Esperanto...

Precizigoj estos sendataj al la interesatoj.
SKRIBU TUJ al : Jean MARIN - 9, Rue Adrien Lejeune - 93170 BAGNOLET . FRANCE
kaj resendu tuj la ĉi-kunmetitan slipon .

---

SLIPO RESENDOTA, KIEL EBLE PLEJ FRUE al Jean MARIN

S-ro, S-ino, F-ino : NOMO : .........................Antaŭnomo :.............

Kompleta adreso : ..................................................................

Profesio :.......................Naskiĝdato : ....K..............

Telefono n° ......................

Mi deziras partopreni en la R.I.D.E.F. 1978 en Svedio.
Mi estos akompanata de ...........................................
Mi ŝatus ricevi informojn pri Freinet Pedagogio kaj R.I.D.E.F.

RIMARKOJ :

Dato - Subskribo :

Resendu TUJ al Jean MARIN ,
9, Rue Adrien Lejeune
93170 BAGNOLET (France)

---

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon
**Directeur de la publication : Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES**
Dépot Légal : 4me Trimestre 1977
Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes